INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA
1990 2025
35 jaroj
Katolika Sekcio de ĈEA

# DIO BENU

Gazeto de IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA
Agnoskita kiel laika eklezia organizaĵo

Jaro 2025 (35) Numero 2 (138)

## FELIĈAN PASKON EN KRISTO RESUREKTINTA!

La partoprenintoj de la kvar kongresoj en la itala urbo Rimini 1997, 2000, 2023 kaj 2008 certe bone memoras la vitraĵon kaj la ceterajn E-freskojn en la preĝejo de la sanktaj Johano kaj Paŭlo, kie paroĥestris sac. Duilio Magnani, la tiama prezidanto de IKUE.




Kiam do estis vespero en tiu sama tago, la unua de la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj, kie la disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis kaj staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. Kaj dirinte tion, li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon. La disĉiploj do ĝojis, vidante la Sinjoron. Jesuo denove diris al ili: Paco al vi; kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas. Kaj dirinte tion, li elspiris sur ilin, kaj diris: Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj. *Joh 20,19-23*

# LA PAPO FRANCISKO EN DECEMBRO 2024 88-JARIĜIS

La Sankta Patro, propranome Jorge Mario Bergoglio, festis sian 88-an naskiĝtagon la 17-an de decembro 2024. La 17-an de decembro 1936 li naskiĝis en Buenos-Ajreso (Buenos Aires) al italaj enmigrintoj Mario José Bergoglio kaj Regina Maria Sivorio, kiel la plej aĝa el kvin infanoj.

Jorge Mario estis baptita ok tagojn post sia naskiĝo, la 25-an de decembro 1936, en paroĥo de s-ta Karlo Boromeo en buenosajresa kvartalo Almagro, fare de itala misiisto don Enrico Pozzoli. Ekde lia alveno sur la tronon de la s-ta Petro ĉiutage antaŭ baptujo en tiu ĉi preĝejo preĝas tiamaj kredantoj por lia papa servo, same kiel tie dumpreĝe restadis li mem ĉiam, kiam jam kiel kardinalo la menciitan paroĥon li vizitis.

Kun la monato decembro nin ligas du jubileoj de Francisko – la 13-an de decembro 1969 Jorge Mario Bergoglio akceptis sacerdotan ordinon el manoj de Ramón José Castellano, kaj la 21-an de decembro 1993 li fariĝis ĝenerala vikario de la ĉefdiocezo Buenos-Ajreso. Kiel sian proksiman kunlaboranton elektis lin tiama ĝia ĉefepiskopo kardinalo Antonio Quarracino, kiu lin ses monatojn antaŭe (27.6.1992) ordinis kiel helpepiskopon (post lia nomumo de la Papo Johano Paŭlo la Dua el 20.5.1992). Bergoglio estis fare de la papo Johano Paŭlo la Dua nomumita februare 2001 kardinalo. Inter liajn ecojn apartenas modesteco. Dum periodo kiel kardinalo li loĝis en negranda loĝejo kaj li uzadis publikajn amastransportilojn.

Dek du jarojn pli poste, la 13-an de marto 2013, estis Bergoglio unu tagon post konklavo en Sikstina kapelo en Vatikano elektita kiel 266-a papo. Kiel la unua papo en la historio li elektis nomon Francisko laŭ la sankta Francisko el Asizo, kaj li iĝis la unua papo devenanta el Ameriko kaj ankaŭ li estis jezuito.

*www.cirkev.cz, 17.12.2024*



La papo Francisko la 24-an de decembro 2024 dum la sankta meso vespere en la baziliko de la sankta Petro en Vatikano inaŭguris la katolikan Sanktan Jaron per malfermo kaj transpaŝo de la sojlo de ĝia pordego. La Sankta Jaro estas dediĉita al la temo de espero. La papo alvokis la katolikojn ne vivi per komforta vivo, sed ili eluzu la Sanktan Jaron por „spirita renoviĝo“ kaj „transformigo de la mondo“.

La sanktaj jaroj estas gravaj datoj en la vivo de la katolika eklezio. La sanktan jaron la katolika eklezio kutime solenas unufoje post 25 jaroj. Sed la papo povas proklami eĉ eksterordinarajn jubileajn jarojn, kiel tio estis ekzemple en la jaro 2015 kaj la plua sankta jaro estas planita por la jaro 2033, kiam la katolikoj ekmemoros eventon de la krucumo de Jesuo Kristo.

# SACERDOTO, PSIKIATRO KAJ ESPERANTISTO MAX KAŠPARŮ RICEVIS LA TITOLON DE ELSTARA DOKTORO

Unu el la ĉefaĵoj de la renkontiĝo de Ĉeĥa Medicina Kompanio estis la ceremonia aljuĝo de la premio „Elstara Kuracisto de la Regiono de Pelhřimov (Ĉeĥio)“. Ĉi tiu prestiĝa premio, tradicie anoncita de la Distrikta Asocio de la Ĉeĥa Medicina Kompanio, celas rekoni kuracistojn, kiuj signife kontribuis al la evoluo de medicino en la regiono aŭ riĉigis ĝin per siaj agoj kaj profesiaj scioj.

Por la jaro 2024, la 20-an de novembro, tiu ĉi premio estis aljuĝita al prof. PaedDr. ThDr. MUDr. kaj MUDr. Jaroslav Maxmilián Kašparů, PhD, dr.h.c., ICEAH, kies eksterordinara profesia kaj persona kariero fariĝis inspiro por la tuta medicina komunumo. En emocia danka parolado prof. Kašparů rememoris siajn komencojn en la hospitalo de Pelhřimov antaŭ pli ol kvindek jaroj, kiam li kandidatiĝis por la posteno de psikiatro.

Profesoro Kašparů havis admirindan karieron. Post komenca studado de dentokuracado en Universitato de Karolo en Prago (la ĉefurbo de Ĉeĥio), li daŭrigis siajn studojn en ĝenerala medicino en Universitato de Komenio en Bratislavo (la ĉefurbo de Slovakio). Li poste specialiĝis pri psikiatrio, kie li akiris atestadojn por ĝenerala kaj infan- kaj adoleska psikiatrio. Li plue vastigis sian kleriĝon en la fakoj de psikosomatio, psikoterapio kaj hipnoterapio, kie li ankaŭ ricevis PhD-gradon. Liaj akademiaj agadoj ankaŭ inkludas pedagogion, etikon, kaj teologion, kio estas signoj de lia speciala perspektivo. Li publikigis pli ol tridek librojn, kelkaj el ili estis tradukitaj en fremdajn lingvojn. Lia literatura verko kombinas medicinajn kaj spiritajn temojn, kiuj reflektas la amplekson de liaj interesoj kaj kapablon ligi diversajn aspektojn de la homa vivo.



*La premiito Makso kun sia edzino Marika*

Li ankaŭ laboras kiel bi-rita katolika pastro, kaj lia spirita agado estas integrita parto de lia persona kaj profesia vivo.

MUDr. Jan Foltin, kiu nomumis profesoron Kašparů por la premio, laŭdis lian kapablon pro empatio percepti la problemojn de homoj kaj trovi ne nur profesiajn, sed ankaŭ humanajn konsilojn, menciante ilin en sia ferma parolado. Li ankaŭ laŭdis lian kapablon nomi la aferojn per iliaj ĝustaj nomoj kaj lian kapablon alparoli aŭskultantojn kun humuro kaj prudento. „Li estas eminentulo, kiu inspiras kaj riĉigas ne nur nian regionon, sed ankaŭ la pli larĝan medicinan komunumon,“ konkludis MUDr. Foltin. La premio „Elstara Doktoro de la Regiono de Pelhřimov“ ne nur omaĝis la unikan profesian karieron de prof. Kašparů, sed ĝi ankaŭ memorigis al ni, kiel esenca estas la kombinaĵo de kompetenteco, homaro kaj humuro en la ĉiutaga laboro de kuracisto.

**Nia kara frato Makso, akceptu sincerajn gratulojn nome de la IKUE – la Katolika Sekcio de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio.**

## NIA FRATO PASTRO SAVIO PAVEL ŘIČICA FORLASIS NIN

***Mardon la 21-an de januaro 2025 atingis nin sciigo, ke la 20-an de januaro fordonis sian animon al la Sinjoro la sacerdoto - dominikano Savio Pavel Řičica.***

Nia kara frato Savio estis ekstendarano ne nur de nia katolika E-tendaro okazinta en sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento en Herbortice (Ĉeĥio), sed ankaŭ jam kiel sacerdoto li estis partopreninto de niaj katolikaj E-tendaroj en Sebranice.

Kun frato Savio ligas min ne nur ambaŭ tendaroj, sed ankaŭ ekstertendaraj aktivadoj en la dominikana ordeno. Post ekrego de komunistoj en nia lando en la jaro 1948 estis perforte likviditaj ĉiuj, precipe viraj, ordenoj de la katolika eklezio kaj multnombraj ordenanoj estis malliberigitaj. Tamen la ordenoj plu ekzistis sekrete aktivantaj, pro kio ankaŭ multaj ordenanoj suferis restadojn en prizono. En okdekaj jaroj mi kun frato IKUE-ano František Adamík estis sekrete akceptitaj en la trian dominikanan ordenon. Mia ordena nomo estis Venturin, lia Damián. Ofte okazis niaj ordenaj renkontiĝoj en paroĥejo Štramberk aŭ en privataj loĝejoj. Por mi tio estis riska afero, ĉar post mia kondamno pro organizado de la katolikaj E-tendaroj en Herbortice, mi estis dum tri jaroj sub polica kontrolo. La komunista sekreta polico ricevadis informojn pri mi, ĉar nia najbaro estis ilia helpanto.

Foje okazis nia ordena renkontiĝo en la privata loĝejo en la urbo Šternberk. Kompreneble dum la renkontiĝoj ĉiam okazis sanktaj mesoj. El fenestro ni vidis, ke iu homo troviĝas en vidproksimeco, por post fino de la renkontiĝo doni signalon al polico. Unua forveturis pastro kaj rande de la urbo haltis lin policaj kontrolistoj. Nenion gravan dumkontrole ili trovis. Li forveturis al loko, de kie li revenis por nin averti pri la polica kontrolo, ĉar en mia aŭtomobilo mi havis multaj religienhavajn librojn por ilia transporto. Informante, ke atendas tie polica kontrolo, ni la librojn elaŭtigis. Volante ankaŭ forveturi kun frato Adamík kaj lia edzino, mi decidis uzi alian direkton por forlasi la urbon. Vane, ankaŭ tie rande de la urbo haltis nin policanoj kaj okazis kontrolo. Post trovo de kelkaj broŝuroj ili ordonis kontroli kofron, en kiu kromalie estis monaĥa dominikana vestaĵo. Mi malfermis de ekstere pordon, kaj iom mi malfermis kofron kaj rapide mi la dominikanan vestaĵon metis sub kofron kaj tiamaniere mi sukcesis kaŝi ĝin. Post la kontrolo ni devis sekvi ilin al la polica urba sidejo. Tuj tie amasiĝis ankaŭ ses policaj aŭtoj, per kiuj ili kontrolokupis ĉiujn ŝoseojn direkte el la urbo. Fraton Adamík ili kondukis en la unuan etaĝon, dum mi kun lia edzino restis en la teretaĝo. Ili demandesploris lin skribante protokolon. Trifoje ili devis la protokolon skribi, ĉar frato Adamík ĉiam rifuzis ĝin subskribi ne konsentante la enhavon. Poste vespere ĉesis tie funkcii elektro, do ne eblis skribi novan protokolon kaj ni fine povis forveturi.



*Olomouc 1992: sac. Stanisław Płachta, František Adamík, Hedvika M. Duřpeková kaj sac. Savio Pavel Řičica OP*

Foje mi estis vizitinta hejmon de la familio Adamík. Apud mia aŭtomobilo ekparkis polica aŭtomobilo, el kiu oni observis, kiu eliras el la domego, kiu havis du elirejojn. Mi bezonis forlasi domon, sed kiel tion fari? Venis al mi ideo trairi kelon de la domego kaj eliri per la dua elirpordo. Poste mi iris tute trankvile al mia aŭtomobilo kaj forveturis. Ili verŝajne ne sciis, ke la apuda aŭtomobilo estis la mia. Frato Adamík pro preso kaj disvastigo de religia literaturo estis kondamnita de la regiona juĝa tribunalo al kelkjara prizona puno. Li



*En la tendaro de Sebranice en la jaro 1991 Savio kun la episkopo Karlo Otčenášek*

apelaciis al la supera tribunalo en Prago, kiu mirakle nuligis la regionan verdikton.

Dum totalisma periodo ni travivis diversajn okazaĵojn. Ĉiumonate vizitis ano de komunista sekreta polico ĉefon de la firmao, en kiu mi laboris insistante, ke li maldungu min. Sed la direktoro argumentis, ke li tion ne povas fari, ĉar mi estras la plej grandan kaj plej bone prosperantan parton de la firmao. Tion li konfidis al mi nur post falo de la komunista regado en nia lando. Danke al Dio, tiu ĉi malĝoja periodo ne plu ekzistas ne nur en nia lando.

Post falo de la fera kurteno kaj komunismo en nia lando mi de nia dominikana estro ricevis rekomendon, ke mi anstataŭ partopreno de la ordenaj kunvenoj kaj plenumo de devoj plene okupiĝu pri la organizado de la katolikaj esperantistoj. Nu kaj tiun ĉi rekomendon mi plenumas dum tridek kvin jaroj ĝis nun, esperante, ke Dio instigos iun kapablan pli junan homon anstataŭigi min, la 84-jarulon en plenumo de tiu ĉi servo. El partoprenintoj de niaj katolikaj E-tendaroj kelkaj ekstendaranoj sacerdotiĝis, inter ili ankaŭ la karmemora pastro Savio, kiu en la tendaro en la vilaĝo Sebranice celebris aŭ kuncelebris la esperantlingvajn sanktajn mesojn.



*Mescelebro en Sebranice por tendaranoj j. 2000 kun sac. Lajos Kóbor el Hungario*



*En KET Sebranice 1997 kun episkopo de Olomouc Josef Hrdlička*



*Kuncelebro kun la ekstendarano episkopo Mons. Antonín Basler en Cotkytle 2019*

**Ripozon eternan donu al la kara pastro Savio Řičica, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.**



*Pane, tys zavolal,*
*a já jsem za tebou šel,*
*popřej mi místa*
*v království svém.*

*Sinjoro, vi alvokis,*
*kaj mi sekvis vin,*
*ebligu al mi ekloĝi*
*en via reĝejo.*

**Sac. Savio Pavel Řičica OP**

naskita 26.9.1958

pastra ordino 25.6.1983

mortis 20.1.2025

*Sinjoro, ni dankas al vi por la vivo kaj la sacerdota servo de via servanto Savio. Ni petas vin, akceptu lin en la eternan vian ĝojon en la ĉielo, kie vi vivas kaj regas por eterne. Amen.*

## ETA JOĈJO KAJ LIA PATRO

Eta Joĉjo eldiris kelkajn speciale fortajn blasfemaĵojn. La patro jam intencis lin bati. Sed poste li ekatentis demandante lin: „Mi petas, de kiu vi tion aŭdis – tiajn vortojn?!“ „De Jesueto...,“ respondis la fileto. „Ankoraŭ vi estas aroga!“ koleras la paĉjo. „Nu, vere,“ defendas sin la filo. „Kiam al ni Kristnaske Jesueto alportis arbeton, mi subaŭskultis malantaŭ la pordo de loĝoĉambro. Kaj kiam li en tiu mallumo stumblis sur io kaj li terĵetiĝis, tiam ĝuste tiujn vortojn li diris!“

* * *

Neniam vi scias, per kio vi edukas... Aŭ eble pli precize: estas bone scii, ke vi edukas eĉ per via ekzemplo. Kompreneble tion, kion vi faras, estas necese al viaj infanoj (malgrandaj eĉ grandaj, sed ankaŭ eble eĉ al viaj geamikoj) dum konvena okazo ekspliki. Diri, kiajn motivojn tio havas. Diradi al si „mi donas bonan ekzemplon kaj tio sufiĉas“ nuntempe ne sufiĉas! Ĉar ni vidas ĉirkaŭ ni multajn ekzemplojn – kaj tre diversajn, la negativajn pli ofte ol la pozitivajn... Sed se vi nur eksplikus, kio kaj kial estas ĝusta, sed vi farus ion alian, ne miru, ke tio ne efikos.

*Sac. Pavel Zahradníček*

Karaj gefratoj kaj la ceteraj legantoj de Dio Benu, bonvolu aliĝi al la 76-a Kongreso de IKUE okazinta de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto en la urbo Brno. Ĉiujn bezonatajn informojn kun la aliĝilo trovu en retpaĝoj de IKUE: https://ikue.org/. Ni esperu, ke per la Dia beno ankaŭ tiu ĉi IKUE-kongreso fariĝos same bonsukcesa kiel la ceteraj IKUE-kongresoj okazintaj en nia lando en Prago 1929, Brno 1936, Olomouc 1995, Kroměříž 2002 kaj Velehrad 2006. Agrablajn kongresajn travivaĵojn deziras al vi redakcio de Dio Benu.

# LA 76-a KONGRESO DE IKUE, BRNO, ĈEĤIO
## „Pilgrimado en la lumo de la kredo“
## de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2025

Sekve post la 110-a Universala Kongreso okazonta julie 2025 en la ĉeĥa urbo Brno, okazos ankaŭ en Brno la 76-a Kongreso de IKUE de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2025. La urbo Brno – la ĉefurbo de la landparto Moravio, estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio, kie jam en la jaro 1936 okazis la 18-a kongreso de IKUE.

La kongreso okazos en la eklezia junulara hejmo Petrinum situanta en la centro de la urbo. La kongresejo estas facile atingebla de la ĉefa fervoja stacidomo kaj ankaŭ de la busa stacidomo (per dekminuta piediro aŭ per uzo de tramo).



En la kongresejo Petrinum ekzistas dormoĉambroj 1-3 litaj kaj ĉiuj ceteraj ekipaĵoj: manĝejo, prelegejo, kapelo ktp.

Kadre de la kongreso okazos ankaŭ vizito de la grava pilgrimloko Velehrad – ligita al la kredheroldantoj la sanktaj Cirilo kaj Metodio kaj la historie grava urbo Kroměříž – la monda kultura heredaĵo de UNESKO. Ambaŭ ĉi tiuj lokoj estas konataj al iamaj partoprenintoj de la IKUE-kongresoj – en Kroměříž 2002 kaj Velehrad 2006. Krom tiuj ĉi du belegaj lokoj okazos ankaŭ vizito de Vieno – la ĉefurbo de Aŭstrio kun vizito de Esperanto-Muzeo.


Brno


Velehrad


Kroměříž

Ĉeĥio gastigis krom la menciitaj ankaŭ la IKUE-kongresojn en la jaro 1929 en Prago kaj en la jaro 1995 en la urbo Olomouc. Do ne hezitu, karaj legantoj tuj aliĝi al la nunjara IKUE-kongreso en Brno, kiu certe enskribiĝos kiel bonsukcesa same kiel la ceteraj IKUE-kongresoj okazintaj en Ĉeĥio. Do ĝis la revido aŭguste en Brno!

# DEKANA PREĜEJO DE LA NASKIĜO DE LA VIRGULINO MARIA EN PÍSEK, ĈEĤIO

Dekana preĝejo de Naskiĝo de Virgulino Maria en Písek estas la plej grava katolika preĝejo en la urbo. Ĝis la 20-a jarcento ĝi estis la plej alta konstruaĵo en Písek kaj krom la Ŝtonponto fariĝis ĝia simbolo.

La preĝejo, situanta sur la plej alta pinto de la urbocentro, nomata „Na Bakalářích“, estis fondita samtempe kun la burgo kaj la urbo surloke de la iama urba muregaro. Temas pri la plej reprezenta kaj plej bone konserviĝinta eklezia verko de la fama konstrumetiejo, estiginta ankaŭ la burgojn Písek kaj Zvíkov.

• Gotika trinava baziliko havas du origine samaltajn turojn; la suda estis en 1489 altigita ĝis 72 m kaj ĝi estas finita per cepforma pseŭdobaroka kupolo el 1805 kun gardĉirkaŭirejo. Je ĝia nivelo troviĝas iama loĝejo de turgardisto kun nigra kuirejo.

• En la sonorilejo pendas 4 sonoriloj el la metiejo de Marie Tomášková-Dytrychová el Brodek u Přerova en norda Moravio; ili venis surloken nur en 1991-2 post la kvindekjara paŭzo (post depreno dum la 2-a mondmilito). La plej granda inter ili, nomiĝanta Sankta Venceslao, pezas 1310 kg. Sur la turo estas lokigita turhorloĝo el 1874, kies unikeco estas, ke ĝia granda montrilo montras horojn kaj la malgranda minutojn. Muroj de la turo larĝas 3,8 metrojn kaj ili mallarĝiĝas ĝis 1 metro.

• En la fronto de la preĝejo troviĝas arte valora enirportalo el 1489 kun emblemo de la ĉeĥa leono.

• Renesancaj ŝildoj de la norda navo devenas el la 16-a jarcento.

• Inter 1741 kaj 1743 estis al la suda navo alkonstruita baroka kapelo de Sankta Johano Nepomuka, ekstere okangula, interne elipseca, en 1886 parte regotikigita.



**Interna ornamo**

Kompare kun la gotika ekstera aspekto, la interno de la preĝejo impresas surprize peze kaj romanikece.

La plej valora arta ornamo de la preĝejo estas malfruromanikaj kaj frugotikaj murpentraĵoj, troviĝantaj sur internavaj pilorioj:

„Demeto de sur la kruco“, „Kristo la Suferanto“, „Krucumo“ kaj „Madono kun Kristo“.

El la origina ekipaĵo kaj meblaro konserviĝis nenio.

La plej malnova estas stana baptujo el 1587, ĥorbenkoj el 1726 kaj baroka altaro de Virgulino Maria la Dolora el 1692 (la aliaj barokaj pentraĵoj estas ekspoziciitaj en la Muzeo de la regiono Prácheň).

En la kapelo de la sankta Johano Nepomuka troviĝas surplafona fresko kun fragmentoj el la vivo de la sanktulo kaj veduto de Písek, verko de Jan Karel Kovář el 1742 (temas pri la plej malnova konserviĝinta

bildo de la urbo).

La nuntempa ekipo de la preĝejo devenas el la tempo de la pseŭdogotika rekonstruo gvidita de fama arkitekto Josef Mocker (rekonstruinta ekz. ankaŭ la burgojn Karlštejn kaj Křivoklát):

* Ĉefaltaro kun statuoj de Virgulino Maria kiel infano kaj ŝiaj gepatroj sankta Anna kaj sankta Joakimo, sankta Cirilo, sankta Metodio kaj 12 apostoloj.

* Preĝejaj benkoj.

* Kopio de gotika bildo de Virgulino Maria de Písek (la valora originalo estis sub strangaj cirkonstancoj ŝtelita en 1975 kaj la kopio estis realigita de Pavel Šneberger).

* La orgeno devenas el 1902, la novgotika krado sub la ĥorejo el 1992.

*Esperantigis PhDr. Pavla Dvořáková,*
*E-klubo „La Ponto“ Písek*

## PREĜEJO

Meze de vilaĝo antaŭurba
staras sur altaĵo
preĝejeto cepotura.
Dometoj ĉirkaŭe kaŭras
kiel sur bild´ malnova,
moderna loĝdomaro
je manetendo proksimiĝis
en urba alpenetro,
kun miksdevena loĝantaro
senkreda jam je Dio,
senkreda jam je materio,
senkreda je partio,
senkreda jam je ĉio
krom propra ĝu´, amuzo . . .

Dimanĉ´ printempa.
Matenaj vizitantoj
de diservo
sporade ascendas;
en navo trionplena
juna pastro
impetpredike
akvumas kredon
de la ĉeestantoj
kaj ĵetas pizojn
kontraŭ muron de oreloj surdaj
de la mond´ ĉirkaŭa . . .

La preĝejo staras
kun krevet´ en muro
super la pejzaĝo apudlima
kun karminaj fumoj
kaj fabrik-haladzoj,
sub montaro staras
kaj atendas
ne finludinte sian rolon.
En alnbranĉaro
fringo kantas
sian laŭdon al ekprintempo
kaj la preĝejeto atendas.

*Jiří Kořínek (EK 1967)*
*Laŭda mencio Belarta Konkurso*
*Budapeŝto 1966*

## LA RUZULO

– Mi kore gratulas vin pro la akiro de loĝejo,
– diras Johano al sia amiko. – Kie ĝi precize situas?
– Tuj apud la fervojo, – informas lin Karlo.
– Sed ĉu ne ĝenos vin la terura bruo de ĉiuj tiuj preterrapidantaj vagonaroj?
– La dommastro asertas, ke oni aŭdas tion nur la unuajn tri semajnojn, kaj tial mi restos loĝanta ankoraŭ tiun tempon en mia hotelo.

# DIO KAJ MATRIMONIO

Kreinto de la matrimonio estas Dio mem. Dio Kreinto establis ĝin saĝe kaj providence kun la celo, por realigi en homoj sian planon de amo. Al la matrimonio Dio aligis specifan "uzinstrukcion". En versio kurtigita ĝi tekstas: "amu la Sinjoron, vian Dion kaj amu vian proksimulon" (kp. Mar 12,28-31). En versio larĝigita, 10-punkta, tri unuaj punktoj koncernas la rilaton kun "Produktisto", kaj sep postaj regulas la rilatojn interhomajn. Al tio la Kreinto aligas la gracon de la matrimonia sakramento, el kies profitado Li garantias plenan feliĉon jam ĉi tie, surtere, kaj mildan trairon al la eterna feliĉo.

Kristo promesis, ke domo konstruita sur roko ne falos (kp. Mat 7,24.27), la roko estas Kristo (kp. 1 Kor 10,4). Ni rimarku, Jesuo ne promesis, ke la domon konstruitan sur roko-Kristo ne albatos ventoj kaj tempestoj, sed Li diris, ke tia domo transdaŭros. Ni havas do simplan, legeblan kaj fidindan recepton por la sukcesa matrimonio: konstruadi nian domon sur Kristo kaj sur Liaj principoj.

Obstaklo estas nia homa malforto kaj pekeco. Tamen la direkto por riparo de la matrimonio por kristano devas esti klara. Ĉiu provo de riparo devas komenciĝi per persona flekso de genuoj (kaj de nuko) ĉe la krado de konfesejo – per la sakramenta konfeso.

La ideo, ke mi unue per miaj fortoj ordigos aferojn kaj kiam mi jam estos "en ordo", tiam mi iros por konfeso – "laŭdi min mem al la Di-Sinjoro", estas sugesto de satano. La sakramenta graco estas ĝuste tiucele, por subteni niajn homajn, eĉ malfortajn, klopodojn.

Mi memorigas la vortojn de s-ta Paŭlo: "la suno ne subiru sur via kolero" (Efe 4,26). Mi instigas al ĉiutaga komuna preĝo vespera, almenaŭ al unu laŭte trapreĝita ge-edza Patro nia. Jam sola eldiro de la vortoj: „kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas" en la Preĝo de la Sinjoro devigas al pripenso. La elementa deco permesos al neniu surgenue eldiri ĉi tiujn vortojn en la stato de malamo kaj soifo fari venĝon al sia edzo (edzino). Ĉi tiu situacio instigas al reciproka pardono al si de eventualaj kulpoj, faritaj malagrabloj kaj vundoj.

Dum unu tago praktike ne povas okazi aferoj ne-pardoneblaj. Tamen kiam nepardonitaj aferoj alkreskas dum semajnoj, monatoj aŭ eĉ jaroj, tiam oni aliras neunufoje al situacio, en kiu home ne videblas ebleco de bona solvo. Tamen eĉ tiam ni memoru, ke „ĉe Dio nenio estas neebla" (Luk 1,37).

Dio ne feliĉigas nin perforte, ne entrudiĝas per sia senfina povo, kiam ni eraras. Respektante la donitan al homo liberan volon, Li parolas: "Vi havas en atingopovo la fonton de mia supernatura povo – gracon de la matrimonia sakramento. Profitu el ĝi, se vi volas…"

Tiel do mia edzino estas al mi donita de Dio mem (cetere laŭ ŝia kaj mia propra deziro). Mia edzo estas al mi donita kaj „taskita". Ni povas iufoje home miri, kial tiu donaco estas tia malfacila aŭ eĉ nervoziga. La ĝojado pro renkontataj malfaciloj – tio estas jam supera plafono alirebla nur al elektitoj.


Sankta fratino Faŭstina, alparolita de superulino, ke certe tial ŝi estas tia ĝoja, ke renkontis ŝin hodiaŭ nuraj plezuroj, respondis: „Kontraŭe, fratino Superulino, renkontis min multaj nemeritataj malagrabloj, kiujn mi povis oferi por povraj pekuloj. Tial mi estas ĝoja". Se la edzo estas fonto de malfaciloj devenantaj de Dio mem, ni ne rajtas ekdubi, ke tio estas la plej bona donaco por mi, t.e. plej bone servas al mia disvolviĝo al sankteco. Ĉar ja la sankteco, kaj ne oportuno, estas la vivocelo de ĉiu kristano.

*Jacek Pulikowski*
*„Trwajcie w miłości", 1/2025*
*Trad. P. Stanisław Płachta OFM*

## KIE ESTAS AMO, TIE ESTAS DIO

Rakonto de Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910).
El rusa lingvo tradukis en la jaro 1912 N. Kabanov.

En unu urbo loĝis botisto Marteno Avdeiĉ. Li loĝis en subtera etaĝo, en ĉambreto kun sola fenestro. La fenestro estis en strata muro. Tra la fenestro estis vidate, kiel pasis homoj. Kvankam nur piedoj estis vidataj, sed Marteno Avdeiĉ ekkonadis homojn laŭ botoj. Marteno Avdeiĉ loĝis delonge sur unu loko kaj havis grandan konatularon. Malofta paro da botoj en ĉirkaŭaĵo ne estis en liaj manoj unu aŭ du fojojn. Al iaj botoj li faris alplandojn, al iaj – flikojn, ian fojon li eĉ renovigis antaŭan parton de botoj. Kaj ofte li vidis tra fenestro sian laboron. Avdeiĉ havis multon da laboro, ĉar li laboradis solide, uzadis bonan materialon, prenadis nemultekostan prezon por laboro kaj plenumadis vorton. Se li povas fari ĝis difinita limtempo, li prenas laboron, se ne, li ne provas trompi, sciigas antaŭe. Kaj ĉiuj konis Avdeiĉ'on, kaj laboro ne ĉesadis ĉe li. Avdeiĉ ĉiam estis bona homo, sed maljuniĝinte li komencis pli mediti pri sia animo, pli proksimiĝi al Dio. Antaŭe, kiam Marteno vivis ĉe majstro, lia edzino mortis. Kaj post la edzino restis sola knabo, trijara. Infanoj ne vivis ĉe ili. Pli aĝaj ĉiuj mortis antaŭe. Komence Marteno volis fordoni filĉjon al sia fratino en vilaĝo, sed poste li ekkompatis lin, pensis: „Malfacile estos al mia Kapitoĉjo kreski en fremda familio, restigu mi lin ĉe mi". Kaj Avdeiĉ forlasis la majstron kaj ekloĝis kun la filĉjo en aparta loĝejo. Sed Dio ne donis al Avdeiĉ feliĉon rilate al infanoj. Apenaŭ la knabo elkreskis, komencis helpi al la patro, malsano atakis Kapitoĉjon, la knabo malsaniĝis, febris unu semajnon kaj mortis. Marteno enterigis la filon kaj ekmalĝojis.Tiel li ekmalĝojis, ke li komencis plendi kontraŭ Dio. Tiel Marteno ekgenuis, ke ne unu fojon li petis de Dio morton kaj riproĉis Dion pri tio, ke li igis morti ne lin, maljunulon, sed la amatan



*Lev Nikolajeviĉ Tolstoj*

solan filon.Avdeiĉ eĉ ĉesis viziti preĝejon. Kaj jen unu fojon maljunulo samvilaĝano preterpasante venis al Avdeiĉ, li pilgrimis jam okan jaron. Avdeiĉ interparolis kun li kaj komencis plendi al li pri sia malfeliĉo.

„Kaj nenia deziro estas," li diras, "plu vivi, Dia homo! Se mi mortus! Nur pri tio mi petas Dion. Mi estas nun senespera homo."

Kaj diris al li la maljunulo:

„Ne bone vi parolas, Marteno, ni ne devas juĝi pri Diaj aferoj. Ne per nia saĝo, sed per Dia juĝo. Dio aljuĝis al via filo morti kaj al vi vivi. Sekve, tiel estas pli bone. Kaj se vi malesperas, ĝi estas pro tio, ke vi deziras vivi por via ĝojo."

„Sed por kio necesas vivi?", demandis Marteno. Kaj la maljunulo diris:

„Por Dio, Marteno, necesas vivi. Li donas vivon al vi, sekve por Li vi devas vivi. Kiam vi komencos vivi por Li, tiam vi malĝojos pri nenio, kaj ĉio montriĝos al vi facila."

Marteno iom silentis kaj diras:

„Sed kiel necesas vivi por Dio?"

Kaj diris la maljunulo:

„Kiel vivi por Dio, tion Kristo montris al ni. Ĉu vi scias legi? Aĉetu Evangelion kaj legu, tie vi ekscios, kiel necesas vivi por Dio. Tie ĉio estas montrita."

Kaj falis ĉi tiuj vortoj en la koron de

Avdeiĉ. Kaj li ekiris la saman tagon, aĉetis al si Evangelion kaj komencis legi.

Avdeiĉ intencis legi nur dum festoj, sed kiam li komencis legi, tiel bone fariĝis al li en la animo, ke li komencis legi ĉiutage. Ian fojon li legas tiel longe, ke eĉ tuta petrolo elbrulas en lampo, kaj li ĉiam ne povas sin deturni de la libro. Kaj Avdeiĉ komencis tiel legi ĉiun vesperon. Kaj ju pli li legis, des pli klare li komprenis, kion Dio volas de li kaj kiel necesas vivi por Dio; kaj fariĝis al li ĉiam pli facile en la koro. Antaŭe okazadis, li kuŝiĝas dormi, ĝemetas kaj ĉiam rememoras Kapitoĉjon, sed nun li nur paroladas: „Gloro al vi, gloro al vi, Sinjoro! Via volo". Kaj de tia tempo tuta vivo de Avdeiĉ ŝanĝiĝis. Okazadis antaŭe, festan tagon li vizitis restoracion por trinki teon kaj iafoje li ne rifuzis trinki brandon. Okazadis, li trinkas kun konatulo, kaj kvankam li ne estas malsobra, sed tamen li eliras el la restoracio malsobrete gaja kaj parolas malseriozaĵon: jen li maldelikate ekkrias al iu, jen li ĉikanas pri iu. Nun ĉio tio ĉi foriris mem de li.

La vivo fariĝis kvieta kaj ĝoja. Matene li sidiĝas por labori, laboras ian tempon, poste li demetas de hoketo lampon, metas sur la tablon, prenas de breto la libron kaj sidiĝas por legi. Kaj ju pli li legas, des pli li komprenas, kaj ĉiam pli serene kaj pli gaje fariĝas al li en la koro.

Okazis unu fojon, Marteno legis tre malfrue vespere. Li legis Evangelion de Luko.

Li legis sesan ĉapitron, legis jenon: „Se iu frapis vin je unu vango, proponu alian; se iu forprenas de vi supran vestaĵon, ne malhelpu forpreni ankaŭ ĉemizon. Donu al ĉiu petanta de vi, ne postulu reen de ĉiu preninta ĉe vi. Kaj kiel vi deziras, ke homoj agu rilate al vi, tiel ankaŭ vi agu rilate al ili".

Li legis pluen, kie Sinjoro diras:

„Pro kio vi vokas min: Sinjoro! Sinjoro! kaj ne faras tion, kion mi diras? Kaj mi diros al vi, al kiu simila estas ĉiu venanta al mi, aŭskultanta miajn vortojn kaj plenumanta ilin: li estas simila al homo, kiu konstruas domon, kiu profunde fosis kaj starigis fundamenton sur ŝtona grundo; pro tio kiam okazis superakvego, kaj akvo surpremis ĉi tiun domon, ĝi ne povis ŝanceli domon, ĉar ĝi estis konstruita sur ŝtona grundo. Sed aŭskultanta kaj ne plenumanta estas simila al homo, kiu konstruis domon sur tero sen fundamento, kaj la domo, kiam akvo surpremis ĝin, tuj ruiniĝis; kaj la ruiniĝo de tiu ĉi domo estis granda".

Avdeiĉ legis ĉi tiujn vortojn, kaj ĝoje fariĝis al li en la animo. Li demetis okulvitrojn, lasis la libron, sin apogis per kubutoj sur la tablon kaj enpensiĝis. Kaj li komencis apliki sian vivon al tiuj ĉi vortoj. Kaj li pensas:

„Nu kiel estas mia domo, ĉu ĝi estas sur ŝtono aŭ sur sablo? Bone estas, se ĝi estas sur ŝtono. Kaj tiel facile mi sidas sola: ŝajnas, ĉion mi faris, kiel Dio ordonas; sed se mi distriĝas, mi denove pekas. Tamen mi penos. Ja estas tiel bone! Dio, helpu min!"

Li meditis tiel, volis kuŝiĝi, sed estis domaĝe sin deturni de la libro. Kaj li komencis legi sepan ĉapitron. Li legis pri centestro, legis pri la filo de la vidvino, legis pri la respondo al disĉiploj de Johano kaj ĝislegis al tiu loko, kie la riĉa fariseo invitis Sinjoron al si, kaj li legis pri tio, kiel la virino – pekulino ŝmiris per oleo liajn piedojn, lavis ilin per larmoj kaj kiel li pravigis ŝin.

Kaj li daŭrigis legi:

„Kaj, sin turninte al la virino, li diris al Simono: ĉu vi vidas tiun ĉi virinon. Mi venis vian domon, kaj vi ne donis akvon al mi por piedoj; sed ŝi surverŝis per larmoj miajn piedojn kaj viŝis ilin per haroj de sia kapo. Vi ne donis al mi kison, sed ŝi, de tiu tempo, kiam mi venis, ne ĉesas kisi miajn piedojn.

Vi ne ŝmiris per oleo mian kapon, ŝi ŝmiris miajn piedojn". Li legis tion ĉi kaj meditas: „Ne donis akvon por la piedoj, ne donis kison, ne ŝmiris la kapon per oleo"...

Kaj Avdeiĉ denove demetis la okulvitrojn, lasis la libron kaj denove enpensiĝis.

*Daŭrigota*

## FASTO KAJ PREĜO

Karaj miaj gefratoj en Kristo,

- Ni laŭdu Dion por ĉiuj ĉi tiuj jaroj dum kiuj ni travivis malfacilajn tempojn en ĉi tiu mondo de maljusteco kaj jen ni vivas.

- Ni laŭdu Dion, ĉar Li estas suverena kaj helpos nin administri ĉi tiun amaran vivon.

- Ni preĝu al Dio, ke ni trovu alternativajn solvojn al la diversaj konfliktoj, kiuj okazas por ĉiu lando.

- Ni preĝu al Dio, ke la transira tempo iru bone.

- Ni preĝu al Dio, ke ĉi tiu jaro povu finiĝi pace por sekuraj landoj.

- Ni preĝu por la potenculoj, kiuj semas rivalecojn inter si celante la riĉecon de aliaj landoj.

- Dio helpu al ni senkulpajn homojn, kiuj ne praktikas la politikon damaĝi la sanon de niaj najbaroj aŭ kolegoj. Ni restu unuigitaj en preĝo.

- Nia kompatema Dio apliku sian volon kaj kompetentecon al niaj maljunaj patroj, patrinoj, fratinoj kaj fratoj sen forgesi eĉ niajn avojn suferantajn pro malsanoj.

Fine, fidu la Eternulon per via tuta koro, kaj ne fidu vian prudenton. Konsciu Lin en ĉiuj viaj vojoj, kaj Li ĝustigos vian iradon. (Sen 3,5-6)

Kaj jen estas la kuraĝo, kiun ni havas antaŭ Li: ke se ni ion petas laŭ lia volo, Li nin aŭskultas. (1 Joh 5,14)

Sed ni petu en fido, neniel dubante, ĉar la dubanto similas ondon de la maro, ventopelatan kaj skuatan. (Jak 1,6)



Ĉiuj vivu ĉi tiun tempon de fastado kaj preĝo laŭ sia maniero kaj per siaj propraj rimedoj.

Fasto estas antaŭ ĉio meti Dion unue.

Estu benita kaj riĉigita!

*Honoré Sebuhoro <honsebn@gmail.com>*

## LA KATOLIKOJ EN RUSIO TIMAS

En debato dum Konferenco de Katolika Episkoparo de Rusio estis pritraktita interalie la afero de la rilatoj inter la Eklezio kaj la ŝtato, precipe koncerne la rilatojn al la projekto de la leĝo pri la malpermeso de diservoj en loĝejoj kaj neloĝitaj blokoj. Kiel estis menciite, la rusiaj episkopoj havas timon esprimitan flanke de reprezentantoj de aliaj konfesioj en la afero kaj ili planas prezenti sian opinion surpapere al la reprezentantoj de la ŝtata povo.

Pli frue oni informis, ke tia projekto de la leĝo estis prezentita al la ŝtata parlamento (Duma) kun la klarigo, ke la diservoj en loĝkonstruejoj „donas eblon al arigado de grupoj da personoj neleĝigitaj kaj pligrandigas la riskon de malbonigado de la kotraŭleĝa situacio“, „limigadas oportunon de la loĝantoj, kio kaŭzas „malkontenton kaj timon de ĝiaj posedantoj“, „provokas hejmajn konfliktojn, rompigas la kontraŭincendiajn normojn kaj publikan sekurecon“. Tamen en multaj rusiaj urboj la katolikoj estas devigataj por la celebrado de sanktaj mesoj uzi la loĝejojn de fideluloj kaŭze de la manko de preĝejoj. La enkonduko de ĉi tiu leĝo grave malfaciligus la animzorgan laboron en multaj lokoj de Rusia Federacio. La projekto de tiu leĝo vekigas timon ne nur de la katolikoj. Oponojn al ĝi anoncis ankaŭ reprezentantoj de la tradiciaj konfesioj, inter ili ankaŭ Rusia Ortodoksa Eklezio.

***Andrzej Grajewski***

*El Semajnrevuo Gość Niedzielny*
*(Dimanĉa Gasto), n-ro 48/2024*
*elpoligis Sławomir Helicumski*

## FIDO NE FACILIGAS AFEROJN, SED EBLIGAS ILIN

***La mondo bezonas Jesuon Kriston, kaj ni devas prezenti nian Sinjoron Jesuon Kriston al la mondo.***




Sinjoro Jesuo Kristo amas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo pardonas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo vin konas;
Sinjoro Jesuo Kristo subtenas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo gvidas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo portas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo vin savas;
Sinjoro Jesuo Kristo vin liberigas;
Sinjoro Jesuo Kristo vin sanigas;
Sinjoro Jesuo Kristo benas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo akompanas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo kuraĝigas vin;
Sinjoro Jesu Kristo protektas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo konsolas vin;
Sinjoro Jesuo Kristo vin vidas;
Sinjoro Jesuo Kristo vokas vin.

La Eternulo militos por vi. Vi silentu. *(Eli 14,14)*

Mia helpo venas de la Eternulo, kiu kreis la ĉielon kaj la teron. *(Psa 121,2)*

Dio estas la centra kolono, sur kiu vi povas ĉiam apogi vin.

Ĝis mia lasta spiro, mi laŭdos Dion!

Kaj nun, fratoj kaj fratinoj, strebu al perfekteco, kuraĝigu unu la alian, interkonsentu, vivu en paco, kaj Dio de amo kaj paco estos kun vi.

Ĉiuj membroj de la popolo de Dio sendas al vi siajn salutojn!

La graco de Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la komuneco de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj!

Paco estu kun ni ĉiuj!

*Honoré Sebuhoro, DR Kongo*

## SINKONSEKRO DE ESPERANTISTOJ AL VIRGULINO MARIA



Ni petas Vin, Virgulino Maria, Patrino de la Eklezio, Patrino de la bona konsilo, estu nia Perantino ĉe via kaj Dia Filo kaj konduku nin al Li. Ĉiam al ni montradu, kiel ni devas vivi kaj servi al homoj kaj al homaro en ĉiu nacio, kiel ĉiujn gvidi laŭ vojo de Spirito, kiel garantii en la mondo justecon kaj pacon.

Tial ni al Vi hodiaŭ konsekras nin kaj ankaŭ la tutan nian kaj tutmondan Esperantan movadon kun ĉiuj ĝiaj taskoj kaj en senlima fido ni metas ĝin en viajn patrinajn manojn. Amen.

# LA DIPATRINO EL ŁUCK

La mirakla bildo de la Dipatrino el Łuck, Ukraino, estas la kopiaĵo de la fama roma portreto de Dipatrino la Neĝa (Salus Populi Romani). La Papo Klemento la Oka donacis ĝin en la jaro 1598 al la episkopo de Łuck (Luck) − la estonta primaso de Pollando − Bernardo Maciejowski, kiu mem venigis ĝin el Romo kaj donacis al monaĥoj dominikanoj.

Dum preskaŭ 250-jara estanteco de ĉi tiu bildo en la preĝejo de fratuloj Dominikanoj en la urbo Łuck, la klostranoj notis 172 miraklojn kaj precipe gracojn okazintaj propete de tie reĝanta Maria. La urbo Łuck estiĝis danke al tio populara celo de pilgrimoj el la tuta Polujo. La mirakla bildo estis kronita la 8-an de septembro 1749 fare de la lucka episkopo Francisko Kobelski per venigitaj el Romo oraj kronetoj, kies donacinto estis vojevodo de la distrikto Volinio (Wołyń) Mikaelo Potocki. La dominikana preĝejo estis trifoje elbrulita, en la jaroj 1793, 1803 kaj 1845, sed la bildo de Lucka Dipatrino transdaŭris sendifekte ilin ĉiujn.

Tamen en la jaro 1847 la sanktejo kaj la monaĥejo estis fermitaj enkadre de la kontraŭkatolikaj reprezalioj flanke de carismaj regantoj, kaj du jarojn pli poste la dominikana ordeno en Rusia Imperio estis kasaciita. Post tio lokaj ortodoksuloj malkonstruis la preĝejon por akiri brikojn por ortodoksa preĝejo, kaj en forlasitaj klostraj konstruejoj ili establis la ortodoksan porpastran seminariejon. La mirakla portreto de Dipatrino estis tiam translokigita al la katedralo de Łuck. Bedaŭrinde, jam en la libera Polujo, en la jaro 1924, kaŭze de averio de la elektra instalo, forbruliĝis la ĉefa altaro kune kun la originala bildo de Lucka Reĝino. La dramon kulminis la dua mondmilito kaj la ŝanĝo de la ŝtataj limoj,



rezulte de kiuj la urbo Łuck ektroviĝis sur la teritorio de la ateisma Soveta Unio, kaj la kateralon bolŝevikoj ŝanĝis je deponejo de kemiaĵoj.

Mirakle oni sukcesis savi la miraklan bildon, devenatan de la jaro 1670, kaj forporti en tiel nomatajn reakiritajn teritoriojn. Kresovianoj (venintaj el orientaj ĉelimaj teritorioj de la antaŭmilita Polujo) lokigis ĝin sur la altaron de la preĝejo en vilaĝo Siedlce apud la urbo Oława en Malsupra Silezio, kie oni honoris Dipatrinon kiel patroninon de kresoj. Laŭ la bildo de ĉi tiu portreto post la falo de komunismo la pentristino Tereza Burczyńska pentris kopiaĵon, kiu estis transdonita kaj lokigita en la renovigita katedralo en la urbo Luck la 26-an de junio 1999.

*Marcin Więckowski*
*El Revuo Przymierze z Maryją 137/2024*
*Elpoligis Stanisław Śmigielski*

**El pensaĵoj de la sankta Johano Bosco**

Ĝojo donas al animoj kreskon, ĝi forpelas enuon, ĝi trapenetras eĉ korpajn organojn per iu viviganta freŝeco, ĝi helpas anime labori kaj ĝi kunigas en la infana koro ideon de amuzo kun ideo de devo. La ĝojo igas la koron konfidema kaj familiara.

## LA EKLEZIO EN KUBO

***La intervjuo kun pastro Adam Wiński, la dioceza direktoro de PDMD (Papa Misia Verko de Infanoj) en Bjalistoko.***

**Pastro Adamo, bonvolu koncize prezenti vin.**

Mi estas sacerdoto de la bjalistoka ĉefdiocezo, animzorganto en la paroĥo de la Plejsankta Virgulino Maria (NMP) la Reĝino de Familioj. Mi tre ŝatas laboron kun homoj, bicikladon, montgrimpadon, vojaĝadon kaj legadon de libroj.

**Mi aŭdis, ke malgraŭ juna aĝo vi laboris en diversaj partoj de la mondo.**

Jes, tio veras. Post la sacerdotiĝo mi laboris en la paroĥo de la sanktaj Petro kaj Paŭlo en Suchowola (la hejma paroĥo de la beata pastro Jerzy (Georgo) Popiełuszko, pli poste en Italio en la urbo Frascati, kie sian unuan sanktan meson celebris la sankta Vincento Palotti (plenkore misiisto), plie dum pli ol ok jaroj en Kubo, en la katedralo de Kristo la Savinto en Bayamo.

**Kubo estas bela, kolorriĉa kaj varma insulo! En Pollando, en majo, ĝojante per koloraj floroj, ni honoras Dipatrinon. Ĉu kubanoj ankaŭ festas majon, la monaton de Maria?**

Jes. Simile kiel ni en Pollando, la kubanoj preĝas la rozarion, la loretanan litanion, kaj ankaŭ volonte pilgrimas al multnombraj marianaj saktejoj. Al la plej konataj tiaj lokoj apartenas la sanktejo de Dipatrino en Guadalupe, kie la tuta Ameriko ŝin honoras kiel la patroninon de ambaŭ Amerikoj (same kiel la Norda tiel ankaŭ la Suda).

**Ĉu infanoj ankaŭ vizitas la sanktejojn de Maria?**

Infanoj en Kubo volonte vizitas sanktejon de Dipatrino nomata Virgen de la Caridad del Cobre. En ĉi tiu loko homoj precipe preĝas dankante por ricevitaj gracoj kaj alportas por Maria florojn – sunflorojn, memorante pri tio, ke Maria estas por ni la plej bela floro – adoranta kune kun ni Dion kaj instruanta nin ĝoje spekti al la ĉielo. La sunfloro (bot. helianto) estas la bela similiganta bildon de Diinfano – turniĝanta al la ĉielo, sed ankaŭ forte radikiĝinta en la tero por poste servi al homoj.



*Sac. Adam Wiński*

**Ĉu post tiom da jaroj vi ekrimarkis ankoraŭ aliajn similaĵojn rilate al Pollando?**

Ni havas ankoraŭ unu komunan distingilon kun latinostoj – ni tre ŝatas procesiojn kun la statueto de Maria. Ni dume preĝas la Rozarion kaj kantas ĝojajn kantojn honore al nia Patrino. En Kubo la plej grava procesio okazas ĉiujare la 8-an de decembro en la tago de la festo de Dipatrino de Cobre. En ĉi tiu tago en ĉiu pli granda urbo homoj vestitaj blankkolore marŝas sur la stratoj kaj irante kun la statuo de Maria ili tiamaniere konfesas kredon kaj amon al Dio kaj la Eklezio.

**Ĉi tiun kredon kaj amon al Dio kaj la Eklezio vi klopodas disvastigi ankaŭ en nia lando, ĉu jes?**

Post la reveno al Pollando mi ekokupiĝis pri misia animzorgado kaj formigado. En la paroĥo kaj diocezo mi klopodas vekigi por misioj ĉiujn − ekde la plej junaj ĝis la plej maljunaj. Mi dividas miajn scion kaj sperton kun studentoj de Centro de la Misia Formado. Mi ĝojas, ke vi invitis min ankaŭ por kreigi „Świat Misyjny" (Misian Mondon). Mi esperas, ke ankaŭ ekster la paĝoj de ĉi tiu revuo ni reale renkontiĝos sur la diversaj misiaj vojetoj.

*Intervjuis **Fratulino Monika Juszka RMI***
*El Świat Misyjny, la dumonata revuo de la Papa Misia Verko de Infanoj, n-ro 3/2024.*
*Esperantigis **Stanisław Śmigielski***

## EKZISTAS TIAJ SACERDOTOJ

En Ĉinio mortis la plej maljuna sacerdoto en ĉi tiu lando, la 104-jaraĝa membro de la verbista ordeno pastro Joseph Guo Fude, kies biografio bonege ilustras la sorton de la katolika eklezio en la Ŝtato de la Mezo. Li naskiĝis en la jaro 1920 (same kiel Karlo Wojtyła), kaj porpastran ordinon li akceptis en la jaro 1947, ankoraŭ antaŭ la formigo de Ĉina Popola Respubliko. Poste li estis sendita fare de sia episkopo por studi en Manila. Li povis resti en Filipinoj, tamen en la jaro 1950 li revenis al patrujo. Li sciis, ke komunisma reĝimo direktas senperan batalon kontraŭ la eklezio, kaj malgraŭ tio li agnoskis, ke en malfacilaj momentoj li ne povas forlasi sian popolon.



Kvankam multfoje estis al li proponita kunlaboro kun la reĝimo, li neniam akceptis tion. En la jaro 1959 li estis arestita unuafoje, li travivis en mallberejo 8,5 jarojn pro „kontraŭŝtata revolucia agado". Apenaŭ li eliris al libereco, denove li estis haltigita kaj akuzita dum kultura revolucio en la jaro 1967 kiel „fremdlanda spiono" por 25 jarojn de mallibereja restado.

Ĉifoje li travivis en la mallibereja ĉelo 12 jarojn. Laŭvican kondamnon por la malleĝa disvastigado de la kredo li ricevis en la jaro 1982. Entute li pasigis en malliberejoj 25 jarojn.

Festante 100-an datrevenon de la naskiĝo la pastro Guo Fude skribis: „Rigardante malantaŭen mian vivon, mi vidas, ke la malliberejo estiĝis la loko, en kiu mi povis primeditadi, preĝadi kaj kreski spirite. Mia malliberigado donis al mi forton, por fronti la malfacilaĵojn de la vivo kaj pli servadi al Dio kun la konscienco, ke ĉiu tiu ĉi provo estas planita de Dio. La malliberejaj restadoj ellernis min, ke la teraj riĉaĵoj estas pasemaj, kaj ununura vera riĉaĵo estas la kredo je Dio.

Pastro Guo Fude postlasis la mesaĝon al junaj sacerdotoj, en kiu li skribis: „Sacerdoteco ne estas la okupo monda, sed la graco donita fare de Dio. Oni devas servi al homoj, sed sen la venenigo fare de la monda spirito; vi devas ami ĉiujn, sed serĉi nenion por sin mem; oni devas unuavice ellerni kliniĝi kaj lavi piedojn de aliuloj, por esti inda aliri al la kerno kaj la sango de Kristo." Li mortis la 30-an de decembro, du monatojn antaŭ sia 105-jariĝo.

*Grzegorz Górny*
*El Semajnrevuo SIECI, n-ro 3/2025.*
*Esperantigis Staniław Śmigielski*

# NOVAĴOJ EL DEMOKRATA RESPUBLIKO KONGOLANDO

Insekto Ekonda, nova minaco por forlokitaj homoj ĉirkaŭ Goma, la ĉefurbo de Norda Kivu - provinco DR Kongolando.



Klimata ŝanĝo foje estas akompanata de apero de laŭsezonaj insektoj. Ĉi tiuj povas esti damaĝaj al sano. Tio estas precipe la kazo de fama insekto, kiun multaj homoj de Kinŝaso nomas Ekonda. De ĝia scienca nomo „Paederus", ĉi tiu insekto liberigas kemian substancon nomitan „Pederine", kiam estas dispremita sur nuda haŭto. Ĉi tio povas konduki al lezoj aŭ brulvundoj, se la haŭto ne estas tuj lavita per akvo kaj sapo.

Fakte, en la tendaroj de delokitoj ĉe la periferio de Goma, malforteco kaj malfacilaj vivkondiĉoj cedas lokon al maltrankviliga sankrizo. Krom la ĉiutagaj problemoj, kiujn ili alfrontas, la forlokitoj nun alfrontas novan malamikon: la insekton Ekonda. Ĉi tiu virulenta insekto ĵus invadis plurajn lokojn de forlokitaj homoj, kaŭzante dolorajn haŭtajn lezojn kaj pligravigante la suferon de miloj da homoj jam forte trafitaj.

La situacio estas kritika, precipe en la tendaroj de Rego, Luŝagala, Nzulo, Bulengo kaj Mugunga. En Rego, Byamungu Senzoga, forlokita persono, esprimas sian zorgon: „La invado de ĉi tiu insekto plimalbonigas nian jam malfacilan ĉiutagan vivon. Ni bezonas tujan intervenon de la aŭtoritatoj por ŝpruci insekticidojn kaj limigi ĝian disvastiĝon. »Lia alvoko, elsendita per *estinfo.org*, spegulas la kolektivan angoron de loĝantoj, kiuj pro manko de rimedoj trovas sin senhelpaj antaŭ ĉi tiu nevidebla minaco.

Vivkondiĉoj en tiuj tendaroj jam estis ege malfortaj antaŭ la apero de la Ekonda insekto. En Mugunga, ekzemple, delokitaj homoj alfrontas konstantajn problemojn aliri trinkakvon kaj sanservon. Tiu ĉi situacio plue malfortigas la loĝantojn de la tendaroj, eksponante ilin ne nur al la insekto Ekonda, sed ankaŭ al aliaj infektoj ligitaj al malbonaj higienaj kondiĉoj. La manko de akvo, kombinita kun malsanigaj kondiĉoj, malfaciligas teni ŝirmejojn puraj kaj pliigas la riskon disvastigi malsanon.

En ĉi tiu sankrizo estas grave, ke oni tuj intervenu, ĉar sen rapida interveno la invado de la Ekonda insekto povus kaŭzi sankatastrofon en ĉi tiuj jam delikataj lokoj. Humanitaraj organizoj kaj lokaj aŭtoritatoj estas instigitaj preni konkretajn rimedojn, inkluzive de aplikado de insekticidaj traktadoj kaj plibonigo de sanitaraj kondiĉoj en la tendaroj.

Alvoko ankaŭ estas lanĉita por plifortigo de medicina asistado, por ke la tuŝitaj povu ricevi taŭgan prizorgon kaj ke oni realigu konsciajn kampanjojn pri bonaj higienaj praktikoj.

*Fonto: estinfo.org.*
*Honore Sebuhoro, DR Kongolando*

En trajno sidas pastro, ordenanino kaj du reprezentantoj de alternativa subkulturo. La pastro havas surbrake gipson.

„Kio okazis al vi, patro?," demandas la ordenanino.

„Mi glitfalis en banujo," respondas la pastro.

Unu el la reprezentantoj de la subkulturo sin turnas al la dua dirante:

„Ha, bovo, kio tio estas banujo, bovo?"

„Mi ne scias, ci bovo, kion do, ĉu mi estas katoliko?" *(www.katolik.cz)*

# TUTE ALIA ĈINIO

Nombranta 1,4 miliardon da loĝantoj Ĉinio estas la plej homplenigita lando de la mondo. Nian imagon pri ĝi klarigas grandaj urboj kiel Ŝanhajo aŭ Pekino. Nun tamen ni ekrigardu tute alian parton meze de la ŝtato.

En la limoj de Ĉinio troviĝas malproksimaj vilaĝoj kaj maldense homloĝigitaj stepoj en nordo kaj okcidento de la lando. Loĝas tie etnaj minoritatoj. Estas inter ili kazaĥoj, mongoloj, mandĵurianoj, ujguranoj kaj aliaj grupoj. Plimulto el ili konfesas islamon, budhismon aŭ animismajn religiojn. La tradicioj de la najbariĝantaj popoloj ofte sin reciproke miksiĝas. Sur la okupataj teritorioj de la indiĝenaj popoloj ili povas parte memstare regadi siajn enlanadajn aferojn. Iliaj lokaj estroj (ofte estas tio spiritaj personoj) havas grandajn influojn. La ĉina registaro ĉiam pli klopodas „ĉinigi" popolojn el etnaj minoritatoj, do alkonformigi ilin mondkoncepte kaj religie al la komunisma ideologio. La celo de ĉi tiu agado estas la subpremado de la sendependaj movadoj kaj la kosoligado de la povo. Ju pli do estas la premo flanke de la reĝimo, des pli gravaj por etnaj minoritatoj estiĝas kulturo kaj religio kiel la elementoj integriĝantaj la socion. La aparteno al religio estas la esprimo de la etna identeco. Pro tio tiel malfacile estas por personoj, kiuj memvole forĵetas islamon, budhismon aŭ animismajn praktikojn sekvi Jesuon Kriston. Tiuj estas traktataj kiel perfiduloj kaj submetataj al persekutadoj. Kelkmil da islamanoj kaj malgranda nombro da budhistoj kaj animistoj en Ĉinio konvertiĝis al kristanismo. Kiel ĉiuj kristanoj en ĉi tiu lando aŭtomate estiĝas malamikoj de la komunisma reĝimo. Sian kredon ili devas tenadi en kaŝiteco eĉ antaŭ la personoj el la plej proksima ĉirkaŭaĵo. La konvinkiteco al Jesuo kaŭzas la premojn el la flanko de familianoj kaj komunumanoj, por reveni el la vojo de la nova kredo. La konvertiĝantoj devas kalkuli pri punoj, forpelo el vilaĝo, perdo de vivrimedoj, fizika perforto aŭ malliberigado.

*Leszek Osieczko*
*La estro de Open Doors en Pollando*
*El Open Doors W służbie prześladowanym chrześcijanom (En la servo de persekutataj kristanoj).*
*Esperantigis Sławomir Helicum*ski



**Ni preĝu:** Sinjoro Jesuo Kristo, vi vokis la sanktan Jozefon Freinademetz kiel misiiston kaj vi sendis lin al Ĉinio. En la povo de Sankta Spirito li anoncadis al homoj la Evangelion pri la savo.

Kune kun li ni petas vin: donu al la ĉina popolo ankaŭ nuntempe la fidelajn heroldojn de via Evangelio, donu familiojn, en kiuj ĉiuj sentos sin sekuraj, kaj sacerdotojn kaj personojn monaĥejajn, kiuj kun la plena sindediĉo laborados en via Reĝejo.

Sankta Patro Jozefo, por viaj amataj ĉinoj elpetu la religian liberecon, por la Eklezio unuecon kaj por kristanoj la povon kaj forton por konservi atestojn de sia kredo ankaŭ en maloportunaj cirkonstancoj.

Kaj por ni mem ni petas Dion por la forta, viva kaj ĝojinda kredo – la saman, kia plenigadis vin dum la tuta via vivo. Amen.

# VOJO – VERO – VIVO

## Usona episkopo Fulton John Sheen


Nuntempe iĝis moderne paroli pri la Savinto kiel pri unu el la religiaj gvidantoj: Validas kiel esprimo de pli alta inteligenteca nivelo Lin vicigi en unu vicon kun Budao, Konfucio, Sokrato... Kvazaŭ la Sinjoro estus simple plua religia instruisto kaj ne mem la religio. Ĉar estis inter la Sinjoro kaj la fondintoj de la religioj malkovritaj iuj similecoj, estis el tio deduktite, ke ĉiuj estas inter si egalgradaj, kaj en Kristo estas trovata nenio dieca. Tio estas io simila, kvazaŭ ni dirus: Sur plimulto de la bildoj en Louvre estas la koloro blanka, ruĝa, verda kaj blua, tial ili devenas de unu pentristo.

**Unikeco – neniuj paralelaĵoj**

Kontraŭe al tio mi volas pruvi, ke la Sinjoro estas en la historio de la religio tute unika kaj tute diferenca de la aliaj instruistoj kaj reformistoj, tiel kiel estas diferenca Dio de la homo.

Tiucele ni povas uzi tri sciigojn: Li diris, ke Li estas vojo; Li diris, ke Li estas vero; Li diris, ke Li estas vivo. Kontraŭ tiuj ĉi liaj diraĵoj ni starigu diraĵojn de aliaj instruistoj.

La unua scenaĵo okazas en Nazareto. Nazareto estis io kiel morta akvo, solejo malproksime de la vivlinio, kie povas vivi neniu, kiu amas mondon kaj havas pli altajn aspirojn ol la vilaĝa ĉarpentisto aŭ kamparano. En tiun urbeton, kiu sin nomas „lia urbo“, Li revenis mallonge post tio, kiam Li komencis sian publikan agadon. Estis tute natura, ke Li volis sin turni kun grava deklaro al siaj samurbanoj, inter kiuj vivis lia sankta Koro kaŝite preskaŭ tridek jarojn. Sabate Li eniris sinagogon. Antaŭis Lin lia famo, ke Li faris an Kana Galilea miraklon kaj trovis en Kapernaum kaj ĉe Jordano kelkajn disĉiplojn. Kiam ĉiuj kolektiĝis en la sinagogo, donis al Li estro de la sinagogo Libron de la profeto Jesaja. La Sinjoro ĝin malfermis en la konata ĉapitro 61, kiu antaŭdiras grandan tagon de la kompato, kiam la Dia sendito rompos katenojn de la peko kaj alportos konsolon al la vundita mondo. Malrapide, klarvoĉe Li alparolas en tiu ĉi sabata mateno al la koroj de ĉiuj ĉeestantoj: *La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis, por bonanonci al mizeruloj. Li sendis min, por bandaĝi tiujn, kies koro estas vundita, por anonci liberecon al kaptitoj kaj malŝloson al malliberigitoj, por proklami favorjaron de la Eternulo kaj venĝotagon de nia Dio.*



*Honorinda Ĉefepiskopo Fulton John Sheen*

Ĉi tie Li ĉesis legi kaj redonis la rulaĵon al la servisto. Sekvis momento da silento, antaŭ ol la Eternulo eliris el sia eterneco kaj anoncis, ke la profetvortoj plenumiĝis. *Hodiaŭ tiu Skribo plenumiĝis, kiun vi ĵus aŭdis.*

Ili ne ekkomprenis tuj plenan sencon de liaj vortoj. Poste eklumiĝis al ili, ke komencas realiĝi dum jarcentoj transdonata espero de ilia popolo, ke antaŭ ili staras

mesio, kiun ili dum jarcentoj sopiratendis, ke Li estas tiu, pri kiu parolas Jesaja, ke ĉion, kion en pasinteco reĝoj, profetoj kaj juĝistoj antaŭdiris pri la estonta Nazaretano, kion prikantis Davido kun granda sopiro, tio tiutage plenumiĝis. Ĉar Li estis tiu, en kiu la tuta Skribo plenumiĝas, pri kiu sopiris nacioj, Emanuelo, ununura vojo de la savo, Dio kun ni.

**Ununura vojo**

Estis tio vero, kiun Li pri si mem proklamis. Ĝia klareco konvinkadis kaj devigis ilin, por ke ili kun lia aŭtoritato interne konsentu: *Ankoraŭ neniam neniu homo parolis kiel Li.* Kiam la Sinjoro sidiĝis, ili rigardis sin kaj vekiĝis iliaj malnovaj antaŭjuĝoj. Anstataŭ Lin konsideri kiel ununuran vojon al la savo, ili ekmemoris, ke Li estas ĉarpentisto, kies domo staras proksime de ĉi tie. Tio estas netolerebla, por ke la civito devu sin submeti al tia viro, por ke la aĝuloj sin lasu instrui fare de la ĉarpentisto. Neniu profeto estas akceptata en sia patrujo. Staras ĉi tie du aferoj: lia Vorto kaj lia Vojo, kaj la fakto, ke Li estas unu el ili: *Ĉu Li ne estas filo de Jozefo?*

Tra sinagogo aŭdigis sin ekkrio de indigneco, kulpigo pri blasfemo. Li ja diris, ke Li estas la Dia vojo. En sia indigneco la homkolektiĝo sin ĵetis kontraŭ Li, eltiris Lin eksteren ĝis monteto rande de la urbeto. Iu ekkriis, ke ili ĵetu Lin malsupren. Kaj okazis io eksterordinara. Ili rigardis sian oferoton, kaj neniu forgesis tiun momenton en sia tuta vivo. Kvazaŭ ilin Dio pelus, ili kuris for de la Nazaretano. Jesuo forlasis sian lokon kaj neniam Li tien revenis.

Dua scenaĵo okazis en Jerusalemo. Okazis tio en festo de laŭboj (samtempe rememoro pri iro tra dezerto). Kiam Jesuo tie vidiĝis, la homamaso Lin serĉtrovis; unuj diris: *„Li estas bona homo.“* Aliuloj male asertis: *„Ne, Li forkondukas popolon!“* Kun admirinda eniro en la eternecon Li al ili proklamis, ke lia instruo estas instruo de Dio, kiu Lin sendis kaj kies Li estas deeterna Filo. Li venis vespere kaj Li estis en la templo ĉe du orumitaj lampoj, ĉirkaŭ kiuj kolektiĝadis la popolo, ja eĉ fariseoj, en ĝoja raviĝo por la festa dancado. La Sinjoro uzis en sia alparolo bildojn el eksteraj cirkonstancoj, kiujn liaj vortoj enpremadis neforviŝeble en la korojn de la aŭskultantoj. Pli antaŭe Li uzis parabolon pri vinberejo, kaj kiam li alparoladis fiŝistojn, li uzis parabolon pri la fiŝoj. Nun Li eksplikis al la mondo sian mision, kiam Li staris en la lumo de la kandelingoj. La Plejsanktulo proklamis sur la sojlo de la ĉefsanktejo, ke la Dia lumo descendis en la homan mallumon: *Mi estas la lumo de la mondo, kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo.*

Liajn vortojn estis ne eble ne kompreni. Li ne diris, ke Li estas kiel lumo, ili povus Lin kompari kun tiuj kandelingoj, kiuj lumigas la mallumon. Ankaŭ Li ne diris, ke Li estas lumo de iu speciala nacio, sed simple, ke Li estas lumo, kiu estas identa kun la vero kaj lumigas ĉiun homon sur tiu ĉi mondo. Por ke Li estu kompetenta al tiu argumentado, Li devus ĉion scii. Sed neniu ekmemoras, ke iu estis Lin vidinta en granda jerusalema lernejo, kiel Li lernas. Neniam Li estis ĉe la piedoj de granda Gamaliel. Tial la aŭskultantoj diris: Kiel tion povas tiu homo scii, se Li ne lernis? Kaj kiam ili demandis: *Kiu vi estas?*, konsternis ilin lia respondo: Li, kiu estas vero kaj lumo de la mondo, havas veron kaj lumon deeterne. Liaj aŭskultantoj ne ekkomprenis lian grandan veron kaj demandas: *Ĉu vi estas pli granda ol nia patro Abrahamo?* Lia respondo estis proklamo pri sia eterneco. Ili respondis al Li: *Vi ankoraŭ ne estas kvindekjara, kaj ĉu vi vidis Abrahamon?* Jesuo diris al ili: *Vere, vere, mi diras al vi: Antaŭ ol naskiĝis Abrahamo, mi ekzistis.*

*Mi estas!* Javeo! Tio estas terura. Tiu viro el Nazareto pri si proklamas, ke Li estas lumo, ke Li estas vero, ke Li estas Dio. Kiel filo de Abrahamo Li estus ilia lumo. Kiel Filo de Dio li estas lumo de la mondo.

La tria scenaĵo estis en Kapernaum, post tio, kiam Li satigis 5 mil homojn. Poste Li antaŭ ili sin kaŝis, ĉar ili volis Lin proklami reĝon. Poste Li eksplikis ĝustan komprenon de la miraklo, kiun Li faris, kiam Li donis al ili panon kaj fiŝojn. Ju pli da bono Li faris al ili, des pli ili konsideris Lin kiel materialan bonfaranton kaj ne vidis gravajn spiritajn aferojn. Sur iliaj koroj kuŝis nur la surtera vivo kaj reĝejo de tiu ĉi mondo. Li faris nun lastan provon ekspliki al ili sian mision: *Vere, vere, mi diras al vi, vi min serĉas, ne ĉar vi vidis signojn, sed ĉar vi manĝis el la panoj kaj satiĝis. Laboru ne por la pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi. Ili diris do al Li: Sinjoro, ĉiam donu al ni tiun panon. Jesuo diris al ili: Mi estas la pano de vivo! Kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos. Kiel la vivanta Patro min sendis, kaj mi vivas pro la Patro, tiel, kiu min manĝas, tiu vivos pro mi.* Tiuj lastaj vortoj estis klaraj kaj unusencaj. Kiel Li diris antaŭe, ke Li estas vojo kaj lumo, tiel Li nun diris, ke li estas vivo de la mondo. Tio ekscitigis kaj kredantojn kaj nekredantojn. Eksplodis la malnova grumblo, ankaŭ ĉe la disĉiploj. Tio estas malfacila parolo, kiu povas Lin aŭskulti?

Nur la grupo ĉirkaŭ Petro restis kaj Jesuo sin turnis al ili: *Ĉu vi ankaŭ volas foriri?* Petro respondis: *Sinjoro, al kiu ni iru? Vi havas la vortojn de la eterna vivo kaj ni ekkredis, ke vi estas Kristo, Filo de Dio.*

Tio estis tiu decidiga punkto. Se Li estas Dio, do Li estas nia vivo, ĉar kio estas Dio, se ne la vivo de la homoj? La ekvacio estis perfekta. Li estis vivo. Li ne venis, por nin alkonduki al la vivo, kiel al ni amiko alportas panon. Li mem estas la pano, estas la Vivo. Tial li faris vespere antaŭ sia morto ion, kion neniu mortulo kapablas fari. Aliuloj transdonas sian havaĵon, riĉaĵon, titolojn. Li hereddonacis antaŭ la morto sian vivon, ĉar kiel la homoj povus vivi sen la Vivo, kiu estas Dio?

Tri grandaj scenaĵoj ripetiĝas nokte antaŭ lia morto. Kiam li diris al siaj disĉiploj lastajn vortojn, interrompis Lin Tomaso demandante: *Kiel ni povas koni la vojon?* Jesuo eksplikas: *Mi estas la Vojo, Vero kaj Vivo.*

Nun al mi iu nomu moralpredikanton, kiu diris similan mesaĝon. Ni menciu Budaon, Konfucion, Sokraton, Mohamedon ktp. Neniu el ili egalas al la vojo de la savo aŭ la vero aŭ la vivo. Tiuj ĉiuj diradis: Ni volas koni la vojon. La Sinjoro male: Mi estas la Vojo. Tiuj ĉiuj diradas: Mi volas al vi diri, kiel vi atingos la veron. Sed la Sinjoro diras: Mi estas la Vero; mi estas la lumo de la mondo. Tiuj ĉiuj diras: Mi volas al vi helpi, kiel atingi senmortecon. Sed la Sinjoro diras: Mi estas la Vivo. Ĉiu granda filozofo, moralisto de la monda historio montras al idealoj, kiuj kuŝas ekster li. La Sinjoro montras mem sur sin.

Kio validas pri la psinteco, validas ankaŭ pri estanteco. Nia malsatanta mondo nepre bezonas pripensi pri tiu unueco de la idealo kaj persono de Jesuo Kristo. Ekde la duono de la 19-a jarcento la homoj provas vivi laŭ sistemoj, laŭ „modernismoj“, sciencista religio, freudismo, teosofismo, spiritualismo, la plej diversaj miksaĵoj de idealismo, putriĝinta saĝumeco, nigra magio, obskurantecaj superstiĉoj, fermentita homa amo, simieca simbolismo, kiuj por momento faras el la homo mistikulon. Sed neniu el tiuj abstraktecoj kapablas kontentigi la homan koron. La koro ne povas vivi laŭ instruo pri la vero, laŭ hipotezo pri la vivo, laŭ teorio pri la amo. La homo povas vivi nur el la amo kaj povas ami nur unu: personon. Permesu al tiu personulo, ke li estu identigata kun la Vojo, sur kiu li iras, kun la Vero, kiun li ekkonas, kun la Vivo, kiun estas necese vivi, kaj el miloj da flankoj de la koro aŭdigos sin dolĉa simfonio de la amo.

*EWIG/11+12 1988*

# VIVU LAŬNATURE

## El libreto Dek paŝoj al ĝojo, 2020, de la aŭtoro Sac. D-ro Max Kašparů

Kiel jam estis skribite en prologo, ni vivos pli bone, se ni estos praktikantoj de la natureca vivmaniero.



*Via vivo kaj mondo estas nigroblankaj*

Pli volonte ol la vorton normaleco, do iun vivnormon, mi uzas la vorton natureco, ĉar normon kiel en la industrio aŭ medicino, tiel ankaŭ en la vivo oni povas ŝanĝi, ĝi do estas ŝovebla.

Ekzemple la emisia normo difinas koncedan enhavon de malignaj substancoj en gasellasaĵoj de la aŭtomobilaj motoroj aŭ laborefekta normo starigas specon kaj multon da laboro, kiun devas laboristo fari dum difinita tempo. Ne estas problemo per uzo de plumo tiujn normojn iel ŝanĝi. Sed ni ŝanĝu naturecon – la akvarian fiŝeton ni donu en la birdneston kaj la birdon el branĉo en la akvon. Ambaŭ pereos.

Estis transpaŝita certa punkto, la tielnomata „punkto de nenatureco“, do la momento, kiam la vivo estis disigita de la naturaj principoj kaj komencis direktiĝi laŭ homaj konstruoj kaj produktoj. Ekzemple la artefarita direktado de fekundeco (kontraŭkoncipo, kutime alireblaj abortigoj) influis fondon de familioj kaj kreskon de la nombro de loĝantaro, Eŭropo formortas. Intence longa studado de junaj homoj senbezone malfruigas komencon de ilia laborokupo, kiu estas necesa por fondi familion. La nenaturecajn intervenojn kontraŭ naturo mi eble ne devas priskribi.

Se ni enrigardas lernolibrojn de matematiko, ankaŭ ĉi tie ni trovas nocion „natura nombro“. La nocion „normala nombro“ la matematiko ne konas.

La naturecon en la homa vivo mi nomus per ofte citata nocio ekologio de la vivo.

Kiam ajn mi eldiras tiun ĉi vorton, mi ĉiam ekmemoras t.n. verdulojn – la pledantojn de la puraj arbaroj, pura akvo kaj pura aero. Nenion mi havas kontraŭ tio, nur ĉagrenas min, ke ili ne parolas pri pureco de la koro, pureco de la konscienco kaj la pureco de la interhomaj rilatoj. Ilia starpunkto estas tipe materialisma, ili volas puran nur tion, kio estas videbla kaj palpebla, la spaco de spirito kaj animo al ili eble diras nenion. Kaj tio estas ĝuste tio interna, kio principe influas tion eksteran. Se sub mia brustosto estas kloakkavo, miaj rilatoj kun homoj ne estos bonodoraj. Se mi havas en la koro malordon, ne estos ĉirkaŭ mi paco kaj bonhumoro.

Pioniroj, rekrutiĝantaj plej parte el teditaj intelektulinoj, propagandas novajn vivformojn kaj seksajn tendencojn.

Iliaj proponoj, por ke ekzemple gepatroj estu indikitaj per numeroj, kaj ne per virinaj aŭ viraj nomoj, kaj infanoj, kiuj en la dua lernoklaso ankoraŭ ne kapablas ligi ŝulancojn kaj manĝi helpe de manĝilo, lernu en la lernejo surŝovi kondomon, mi opinias kiel altmoderna, progresa, interesa, nekutima kaj avangarda, sed tio ne signifas, ke tio estas natureca.

Naturece estas ne konsumi drogojn kaj

ne ebriiĝi, naturece estas respekti vivon ekde komenco ĝis la natura fino, naturece estas ne mensogi, ne ŝteli, naturece estas krei familiojn. Naturece estas havi sanan ĝojon, ĉar kun ĝojo oni povas krei kaj konstrui valoraĵojn. Tial ankaŭ bonkvalita spiritualeco kontribuas al la fizika sano. Homoj estas pli sanaj, se ili evitas koleron, kaj tial estas nature pardonadi.

Estas naturece ne vantigi tempon, vivi kaj ripozi plene.

Ni revenu al la naturecoj, kiujn verigis jarcentoj. Ni ne timu tiun paradokson, kiam antaŭeniri signifas iri returnen. Por nia propra ĝojo.



„Ho, mi aŭdis, kara kolego, ke vi estas fama kardiologo."

Ilustraĵo de Jan Horalecký



**ROZARIO**

**kunpreĝado per ZOOM**

**por IKUE, por la paco en Ukrainio, Palestino kaj ceteraj landoj, kie furiozas militkonfliktoj.**

**Ĉiutage je la 20:15 horo (UTC+2)**

**Aliĝu ĉe: ikue.reto@gmail.com**

# PRI LA FONDO DE LA STRASBURGA KATEDRALO

Furioza batalo estis inter frankoj kaj alemanoj ne malproksime de Zulpich (apud Koeln ĉe Rejno). Ree la frankoj, kondukataj de sia reĝo Klodwig, penetris en la alemanajn vicojn, kaj ree ili post furioza batalado devis formarŝi.

Multaj kuraĝaj batalintoj el la militistaro de Klodwig kuŝis senmove sur la batalkampo, kaj la malamikoj ŝajne pli kaj pli multiĝis. Kvazaŭ el tero kreskintaj, aliaj soldatoj anstataŭis la falintojn kaj batalis kun kuraĝo de malespero.

La bravaj frankoj kvazaŭ superhome sin defendis. Sed la malamikoj ilin tamen dum ĉiu momento plie repuŝadis. Jam sovaĝiĝis la militistoj pro malespero, kiam Klodwig en la plej grava animsufero levis la brakojn al ĉielo kaj per fortega voĉo ekkriis: „Montru Vin, Dio de la kristanoj! Dio de mia edzino! Miaj dioj min forlasis! Miraklon okazigu, kaj igu min venki la malamikojn. Vere, mi dum tuta mia vivo vin dankos pro tio kaj nur je vi mi kredos, kaj vian krucon mi starigos sur la restaĵojn de la idolistaj temploj!“

Apenaŭ la reĝo de la frankoj tiamaniere estis finpreĝinta, la ĉielo eklumiĝis per miriga brilo, kaj meze de tiu ĉi ilumino staris kruco kun la promesa surskribo: „Per tiu ĉi signo vi venkos!“

La tuta militistaro ĉeestis ĉi tiun miraklan, vizian spektaklon. Nova kuraĝo kaj nova entuziasmo tratremis la koron de ĉiu batalanto. La frankoj denove atakis tiel forte, ke la malamikoj ne plu povis kontraŭstari.

Vespere la reĝo de la frankoj estis venkinto post la kuraĝa batalo apud Zulpich.

Sed la ĝojo pri la akirita venko daŭris nur dum mallonga tempo. Klodwig forgesis tre baldaŭ sian devon de danko al la potenca Dio de la kristanoj, kiu lin savis. Dume lia pia edzino lin admonadis, ke li sian promeson plenumu kaj starigu la krucon de la kristanoj sur la ruinoj de la temploj de la falsaj dioj, kaj insistis lin al konverto.



*La katedralo Notre-Dame en Strasburgo konstruita en la jaroj 1015-1439.*
*La partoprenintoj de la ekumenaj seminarioj kaj la kongreso en Strasburgo ekkonis tiun belan katedralon.*

Dum tiu tempo vivis la bona kaj pia episkopo Remigius, al kiu la reĝino plendis pri sia ĉagreno. Ĉi tiu konsolis ŝin kaj igis ŝin fidi al Dio, kiu ja povos moligi la malmolan karakteron de la reĝo. Kaj tio ankaŭ okazis, Remigius povis fine kristanigi la reĝon post longa, denova interparolado kun li.

Sur la plej alta parto de la urbo – antaŭ multaj, multaj jaroj – staris fagaro, dediĉita al la dioj. La antikvaj keltoj tie preĝis al ili, kies volon ili ekkonis el la bruado de la foliaro kaj el la stranga zumado de la nokto. Apud la oferaltaro elfluis klara, freŝa akvo, en kiu la pastroj lavis la bestojn destinitajn por oferado.

Jam de longe la arbareto ne plu estis. La romianoj siatempe konstruis sur tiu loko ŝtonan templon honore al sia militodio Mars, sed la fonto ankoraŭ ŝprucis el la sanktigita terloko.

Tie Remigius baptis la reĝon Klodwig kune kun tricent ĉefuloj el la plej nobelaj frankaj gentoj.

En blanka tolvestaĵo la ĝis nun obstinaj kaj kuraĝegaj militistoj staris antaŭ la sankta episkopo.

Ĉi tiu unue alparolis la reĝon kaj per forta voĉo diris: „Vian kapon klinu, fiera viro, kaj adoru tion, kion vi bruligis, kaj bruligu tion, kion vi adoris“.

Genufleksante, la reĝo tion promesis.

Kaj la episkopo ĉerpis manplenon da akvo el la fonto kaj baptis la reĝon kaj liajn fidelulojn je la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito.

Nun ili estis akceptitaj de la eklezio kaj devis zorgi pri la konvertiĝo de la idolanoj kaj pri ilia vivo.

Kaj la reĝo Klodwig donis bonan ekzemplon. Li ordonis malkonstruon de la malnova templo de Mars kaj sur ĝiaj ruinoj konstruigis kristanan preĝejon el ligno kaj ŝtonoj. Ĉi tiun li poste dediĉis al la Sankta Triunuo kaj al la Madono.

Tiamaniere estis fondita la unua katedralo en Strasburgo fare de la unua reĝo de la frankoj.

Tio okazis en la jaroj 504-510.

Sed la unua preĝejo estis detruita per incendio, kaj dezerta restis la loko dum multaj jaroj.

Nur episkopo Verner komencis la rekonstruadon de la forbruligita preĝejo danke al la piaj mondonacoj, kiuj estis senditaj al li. Episkopo Konrad de Lichtenberg konstruigis la fasadon. Grandaj estis la fervoro kaj la entuziasmo de la strasburganoj pri la konstruado. La riĉuloj donacis grandajn monsumojn, la malriĉuloj ekprenis fosilojn, martelojn kaj trulojn kaj konkuris en la laboro pro la honoro de Dio.

Dum multaj jaroj sonegadis la bruo de la martelegoj en la Vogezaj valoj, kiuj la ruĝajn, vogezajn ŝtonegojn elrompis, kaj la bruo de la laŭtaj voĉoj, de multpezaj ĉaroj, kiuj grandajn kvadratajn ŝtonegojn fortiris al Strasburgo.

Tie, sur la vasta placo, laboris la ŝtonhakistoj per martelo kaj ĉizilo. Jen ili formis el malmola ŝtono statuon de pia sanktulo, jen la ruĝa ŝtonego baldaŭ rikanis la vizaĝon de iu diablo aŭ de iu ajn timiga karikaturo, kaj en la angulo dolĉaj anĝeloj atendis sian starigadon en la penege pligrandiĝanta konstruo, kies arkitekto estis Ervin de Ŝtejnbaĥ.

Kiam iun fojon la majstro mediteme rigardis la konstruon, ĉar ĝi ne progresis laŭdezire, kaj pripensis, kiamaniere oni plej rapide kaj plej facile povos akceli la konstruon, la diablo paŝis al li kun afabla rideto, dirante: „Mian saluton, estimata majstro; mi nur tro bone scias tion, kio vin turmentas; kaj mi vin tro multe amas, ke mi ne helpu al vi. Se vi al mi vendos vian animon, mi fulmrapide finos la konstruadon“.

Abomenplene majstro Ervin malakceptis la proponon de la diablo kaj petis la ĉielon pri helpo.

Kaj ho! Ĉiela anĝelo el la nuboj flugis kaj ordonis al la nevideblaj helpantoj de la ĉielaj estuloj, ke ili finu la konstruadon.

Fiere baldaŭ superstaris la pinto de la turo en la ĉielobluaĵo kvazaŭ videbla signo de potenco kaj forto de Dio, al kiu la nova katedralo estis dediĉita.

Al la majstro bonege helpis lia filino Sabina, la artistino, kies belecon oni ĉie en lando laŭdis. Multajn belegajn artverkojn kreis la delikata mano de la knabino, kies koro estis plena de fervoro kaj kredo, kies versigno devis esti la belega, mirinda katedralo dum ĉiamaj tempoj.

Sed per kreado de ĉi tiuj artaĵoj Sabina al si mem akiris kronon neforigeblan.

Kaj kiam ni mirante kaj admirante rigardas la belegan katedralon, la ĉefverkon de preĝeja arkitekturo, la konstruaĵon el jarcentoj da penega laboro, ni ankaŭ ne forgesu la junan arkitekton kaj ŝian faman patron Ervin de Ŝtejnbaĥ.

*El Esperanta Biblioteko Internacia, n-ro 28, Elzasaj Legendoj, Tradukis Charlotte Pulvers, Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H. Berlin kaj Dresden, 1924.*

*Por legantoj de Dio Benu disponigis Stanisław Śmigielski.*

- Kiamaniere vi aranĝis tion, ke vi sukcesis vidi Romon en tri tagoj?
- Tre simple: la edzino rigardis la preĝejojn, la filino la monumentojn kaj muzeojn kaj mi dume prenis la kafejojn kaj restoraciojn je mia parto. *(El Heroldo de E.)*

**„Všechno má určenou chvíli a veškeré dění pod nebem svůj čas."** *(Kaz 3,1)*

Milí bratři a sestry, ano, všechno pod nebem má svůj určený čas, jak nám praví v Bibli Kazatel. To v současné době je zvláště také aktuální pro mne, kdy můj věk (84) napovídá, že je potřeba předat kormidlo naší sekce vhodnému mladšímu kormidelníku. Nepodařilo se mi dosud najít vhodnou osobu, která by byla ochotna převzít vedení naší katolické sekce namísto mne. Naše sekce nemá právní subjektivitu, kterou se mi po půlročním loňském jednání podařilo zrušit. Zůstává však nadále sekcí Českého esperantského svazu. Pro členy sekce nemáme stanovený roční příspěvek. Celou dobu od znovuzaložení sekce v roce 1989 sekce hospodařila s dobrovolnými finančními příspěvky členů až do dnešních dnů, které byly použité k technickému zajištění provozu sekce včetně tisku a poštovného za časopis Dio Benu. Funkci předsedy jsem po celou dobu vykonával bez jakékoliv finanční odměny. Přebytečné finanční prostředky z příspěvků a organizování tří IKUE-kongresů a dvanácti táborů v Sebranicích byly poukázány IKUE a ČESu.

Milí bratři a sestry, cítím, že dozrál čas, aby někdo namísto mne převzal vedení sekce a vydávání Dio Benu. Tento náš časopis je sestavován v programu Adobe InDesign, který mému náhradníkovi předám a jsem ochoten podle možnosti spolupracovat. Mrzí mne, že se nenašlo více členů, kteří by články přispívali do našeho časopisu. Těším se, že se někdo nabídne převzít vedení sekce, případně, že navrhnete někoho, kdo by na tuto funkci byl vhodný. Náš časopis Dio Benu vyjde do konce roku a bylo by vhodné, kdyby pak i nadále vycházel.

S pozdravem a přáním Božího požehnání a ochrany Panny Marie zůstává a Vás zdraví Váš bratr Miloš.

**Grava informo:** En la nunjara monato marto ĉesis funkcii la ĝisnuna banka konto n-ro 2700247564/2010. Monkontribuaĵojn oni nun povas sendi al la konto de Miloslav Šváček: 1647837113/0800. IBAN CZ80 0800 0000 0016 4783 7113 BIC GIBACZPX

**Důležitá informace:** V měsíci březnu ukončil funkci dosavadní bankovní účet sekce 2700247564/2010. Příspěvky sekci lze nadále posílat na číslo účtu: 1647837113/0800.

**DIO BENU** Vydavatel: IKUE-Katolická sekce Českého esperantského svazu. Adresa redakce: IKUE-Katolická sekce ČES, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice. Zodpovědný redaktor: Miloslav Šváček, tel. +420 732 420 675, e-mail: m.svacek@seznam.cz. Bank. spojení: Česká spořitelna, a.s., Přerov, číslo účtu: 1647837113/0800.
IBAN CZ80 0800 0000 0016 4783 7113 BIC GIBACZPX
Registrační číslo MK ČR: E 12647. ISSN 1803-8387 (Print), ISSN 3029-701X (On-line).

# REĜINO DE MAJO ESTU SALUTATA






2. Sub la kruc´ de l´ fil´vi staris, vidis Lin.
Tiom via kor´ amaris, Dipatrin´.
Via fil´ pro Sia morto
dotu nin per vivo-forto.
Petu vi pri nia sorto, Virgulin´.

3. Estas vi, Maria, super ni reĝin´,
pledantino nia de pratemp´ ĝis fin´.
La popolon vi memoru,
por ke Dion ĝi adoru,
dece ankaŭ vin honoru, Dipatrin´.

Z DAWNA POLSKI TYŚ KRÓLOWĄ, muziko kaj teksto anonimaj, esperantigita de Albrecht Kronenberger

## PREĜO AL SANKTA MARIA

Sankta Maria, Dipatrino, konservu al mi infanan koron, la koron puran kaj klaran kiel montara fonto. Elpetu por mi koron simplan, kiu vivtenas en si nek malĝojon nek amaron, la koron teneran kaj kompateman, la koron fidelan, kiu ne pensas nur pri si mem, kiu forgesas neniun bonfaron kaj rememoras neniun maljustaĵon.

Donu al mi, Maria, la koron mildan kaj humilan, kiu amas kaj ne atendas rekompencon, la koron grandan, neniam deprimantan, kiun malvarmigas neniu maldankemo kaj lacigas neniu indiferenteco, la koron en ĉio serĉantan nur gloron kaj ĝojon de Jesuo Kristo, vunditan pro amo al Li per la vundo, kiu resaniĝos nur en la ĉielo. Amen.